

Esperanto en

<http://www.esperanto.or.id/>

Indonezio

Duonjara Bulteno Jaro 5 Numero 2 — Decembro 2016

Eldono
Edisi

11



ĈEFAJ TEMOJ ★ TAJUK BERITA

- Raporteto de 8a Azia Kongreso
- Festo de Zamenhof-tago en Indonezio

↖ SUR LA KOVRILO ★ DI HALAMAN MUKA

1. Grup-diskuto en Zamenhof-tago
2. Nova grupo de Esperanto ĉe Faktabahasa Depok
3. Piknikantoj de Ĝakarta E-klubo
4. La Unua Komuna Foto de IEA estraranoj

✉ arman.yusuf@gmail.com

Arman Yusuf @ Ĝakarta

Saluton karaj legantoj! Jen la 11a numero de nia bulteno. Ni ĝojas prezenti al vi la lastan numeron de nia bulteno ĉi-jare. En ĝi, troviĝas diversaj artikoloj rilate al la movadoj, esperantaj aktivecoj kaj informoj kiuj riĉigas vian scion pri Esperanto.

En ĉefa temo, vi legos raporteton pri 8a Azia Kongreso kiu okazis en Quanzhou-urbo, Ĉinio kaj raporto pri festo de Zamenhofa tago kiu estis organizita de Ĝakarta e-Klubo kun Indonezia Esperanto-Asocio (IEA).

Gravaj informoj pri membreco, IEJO (Indonezia Esperanto Junerala Organizo) kiu estas konata kiel "Forperin"; realigitaj kaj planitaj agadoj de IEA, vi legos ĉe IEA Estas Nia Domo.

En Lokaj Novaĵoj, niaj karaj kontribuantoj skribis interesajn artikolojn pri siaj esperantaj aktivecoj, ekz. raporton de Ĝakarta E-klubo pri sia amuza pikniko kaj vojaĝsperto en Ĉinio kaj Nepalo.

La Jogjakarta E-grupo ankaŭ kontribuis sian artikolon en la Movado inter aliaj artikoloj de amiko el Tajvano, kaj de Ĝakarta pri Esperanto-kurso per WhatsApp.

En la lasta paĝo vi povas legi interesan rakonton de eksterlandano.

Halo para pembaca yang budiman! Inilah buletin ke-11 kita! Kami senang menyajikan buletin edisi terakhir di tahun ini. Di dalamnya, temukanlah berbagai artikel seputar pergerakan dan aktivitas Esperanto, serta informasi lain yang memperkaya pengetahuan Anda akan Esperanto.

Di tajuk berita, Anda dapat membaca berita mengenai Kongres Asia ke-8 di Quanzhou, Cina. Ada juga cerita perayaan Hari Zamenhof yang diorganisir oleh klub Jakarta bersama IEA.

Beberapa informasi penting mengenai keanggotaan, IEJO (lebih dikenal sebagai "Forperin") serta realisasi/rencana kerja IEA; semuanya bisa dibaca di bagian Rumah Kita, IEA.

Di Berita dari Sekitar Kita, para kontributor kita yang baik menulis berbagai artikel menarik seputar aktivitas mereka, misalnya klub Jakarta yang mengadakan piknik fenomenal, serta pengalaman jalan-jalan ke Cina dan Nepal.

Grup Yogyakarta juga menyumbangkan artikel di Gerakan Esperanto, artikel dari teman kita di Taiwan, serta kursus Esperanto melalui WhatsApp.

Di halaman terakhir kita dapat membaca tulisan menarik dari rekan di luar negeri.

Semoga edisi ini menjadi bahan bacaan yang menarik! :-)

Do, ni deziras bonan legadon! :-)

Enhavtabelo ★ *Daftar Isi*

Antaŭparolo ★ *Kata Pengantar*

Ĉefaj Temoj ★ *Tajuk Berita*

Raporteto de 8a Azia Kongreso	3
Festo de Zamenhof-tago en Indonezio	4

IEA Estas Nia Domo ★ *Rumah Kita, IEA*

Varbi Membrojn de IEA/ <i>Mari Menjadi Anggota AEI</i>	5
Ngobrol Bareng Ilija, Yuk!	5
Pendaftaran Forperin.....	6
La Realigitaj Agadoj en 2016 kaj La Planitaj Agadoj en 2017. 8	

Lokaj Novaĵoj ★ *Berita dari Sekitar Kita*

Raporto de "1a Esperanta Pikniko de Esperiga Suno"	9
Mia Unua Sperto en La Pikniko de Ĝakarta E-klubo/ <i>Pengalaman Piknik Pertama Dengan ...</i>	10

Mia Esperanta Pikniko al Anyer (Arya)	11
La Esperanta Pikniko en Anyer (Erlan)	11
Esperanta Zono, Kiel Mojosa!/Zona Esperanto, Keren	12
Vojaĝo kun Esperanto al Ĉinio kaj Nepalo	13

Movado ★ *Gerakan Esperanto*

La Eta Rakonto el Jogjakarto	14
Vi Ne Bezonas Lerni Tuton!	15
Esperanta Kurso per WhatsApp	16

Eksterlandaĵoj ★ *Berita Luar Negeri*

Dankon, Onklo Julius	17
----------------------------	----

Postskribo ★ *Tulisan Penutup*

Raporteto de 8a Azia Kongreso

✉ ilia.dewi@gmail.com

Ilia Sumilfia Dewi @ Ĝakarto



Unu el gravaj aranĝoj en Azio estas la Azia kongreso kiu ĉijare okazis en Quanzhou-urbo, Fujian-provinco, Ĉinio kun la ĉeftemo “Esperanto por la Azia kunlaboro en interreta epoko”.

Tiu 8a kongreso okazis je la 3a ĝis 6a de Novembro dum kiu paralele ankaŭ okazis samloke la 5a ILEI-Seminario en Orienta Azio kaj la 10a Jarkunveno de IKEF-Ĉinio. En la kongreso (inkluzive de supremenciitaj du eventoj) partoprenis pli ol 270 personoj el 24 landoj kaj regionoj.

La malferman inaŭguron ĉeestis honoraj gastoj, nome Vic-urbestrino de Quanzhou, Vic-prezidanto de Ĉina Internacia Eldona Grupo - tegmenta organizo de ĈEL, Prezidanto de ĈEL s-ro Chen Haosu, Estrarano de UEA pri Azio s-ro LEE Jungkee, Ĝenerala direktoro de UEA s-ino Veronika Poor kaj aliaj.

Dum la kongreso oni okazigis diversajn programojn ekz. prelegoj, kunsidoj, ekspozicio, ekskursoj, interkona vespero, nacia kaj internacia vesperoj. Precipe rilate al la temo, oni ankaŭ faris diskuton kaj provas konkludi konkretajn agadojn por kunlabori bone per reto kiu certe pli efikas en la vasta kontinento, Azio.

Kiel reprezentanto de Indonezio por la unua fojo, mi tre ĝojis

havi ŝancon por partopreni la kongreson, renkontis malnovajn geamikojn kaj konatiĝis kun novaj aliaj. Mi pli ofte ĉeestis en la programo de landa agado kaj prelegoj kiuj rilatas al la instruado de Esperanto en diversaj landoj.

Mi ankaŭ unufoje partoprenis en la grava kunsido de KAEM (Komisiono de Azia Esperanto-Movado). Unu el la plej freŝaj novaĵoj estas tio ke dum KAEM-kunsido oni elektis s-ron So Jinsu, korean KAEM-anon kiel novan prezidanton de la komisiono. Vicprezidanto kaj sekretario restas samaj kiel antaŭe, vicprezidanto estas s-ro Inumaru Fumio el Japanio kaj sekretario estas s-ro Ĉimedtseren Enkhee el Mongolio.

Alia grava novaĵo estas ke sekva, la 9a Azia Kongreso okazos en 2019, en Vjetnama, Danang-urbo kiu estis decidita inter aliaj proponoj de Nepalo kaj Indonezio.

En tiu lasta kongreso, mi ankaŭ ĝojis konatiĝi kun multaj junaj volontuloj kiuj ĵus nelonge lernis Esperanton. Ili entuziasme provis interagi kun kongresanoj kvankam ili ankoraŭ malfacile komprenas la lingvon. Tamen mi vidis ke ili klopodis bone plenumi la taskon por sukcesigi la kongreson.

Ĝenerale mi pensas ke la kongreso sukcese okazis kaj espereble plifortigos la movadon en Ĉinio speciale kaj Azio.

Festo de Zamenhof-tago en Indonezio

✉ ilia.dewi@gmail.com

Ilia Sumilfia Dewi @ Ĝakarto



Dimanĉe je la 18a de Decembro ni sukcesis okazigi Esperanto-feston okaze de "Zamenhof-tago". La festo estis organizita de Indonezia Esperanto-Asocio kiu kunlaboris kun lingva komunumo "Faktabahasa" kaj Ĝakarta E-klubo "Esperiga Suno".

Partoprenis 18 personojn kiuj plejparte estas komencantoj kaj kelkaj progresantoj. Unue, ni grupiĝis inter komencantoj kiuj daŭrigis la lecionon de baza kurso kaj paroliga sesio por la progresantoj. Poste ni komencis la feston pere de marŝado al bela ĝardeno apud lago samtempe kantante E-kanton. Tie sub la granda arbo kaj sufiĉe freŝa aero ni ĝuis niajn variajn agadojn; grup-diskuto, konkursoj de kanti, legi poemon, aktoriĝi, multe aliaj.

Dum nia festo, ni surpriziĝis pro la ĉeesto de s-ro "Zamenhof". Ni ĝoje bonvenigis lin kaj kune kantis la kanton, "bonan naskiĝtagon". Fine li konsilis al ĉiuj por daŭre disvastigi siajn ideojn pri lingva ĝusteco, paco kaj amikeco. Tiu estis parto de nia amuza festo kiam nia amiko, Rizki Maulana prenis la maskon de Zamenhof.

Ni festis dum kvin horoj kaj amuziĝis, ridegis, interŝanĝis spertojn, opinion, precipe al la komencantoj por ke ili havu motivojn kaj diligente lernu Esperanton kaj diskonigi la amikecan etoson de nia lingvo.

Antaŭ la fino, ni faris komunan foton kiel memoraĵo de nia bela festo kaj kolektigis la komentojn de ĉeestantoj kiujn ili skribis sur la paperoj. Feliĉe, ke ĉiuj pozitive ĝuis la feston kaj amuziĝis pro la bona programero.

Koran saluton el Indonezio!

Nome de Indonezia Esperanto-Asocio (IEA), mi ŝatus deziri "Feliĉan Novjaron, 2017" al ĉiuj samideanoj en Azio. Ni daŭre agu ke nia verda rondo kaj familio povus pozitive kontribui al niaj ĉirkaŭaĵoj pere de Esperanto kaj esperu pli bonan vivon por ĉiuj. Ni, ĉiuj scias ke la defioj kaj obstakloj de venonta jaro povus esti pli malfacilaj. Tamen ni ne malesperu, aktive kunlaboru kaj gardu esperon ĉar ni estas esperantistoj.

Azio estas estonteco de nia lingvo. Tial la laboro de niaj senlacaj movadanoj bonrezultas pli kaj pli. Dum la lasta jaro, ni jam legis kaj aŭskultis bonajn novaĵojn de Tajlando, Filipino, Irano, ankaŭ de Indonezio ke la Esperanto-movado multe progresas. Tiu certe bone influas la movadon en Azio ĝenerale.

Ankaŭ mi instigu.."ni sukcesigu la Universalan kongreson en Seulo!" Ĝi certe gravas por nia movado.

Ĉion bonan al vi!



Varbi Membroj de IEA

Mari Menjadi Anggota AEI

Se vi estas indoneziano kaj interesiĝas pri Esperanto aŭ eĉ jam lernas aŭ parolas tiun neŭtralan lingvon, vi nepre konsideru membriĝi al la Indonezia Esperanto-Asocio. Tiel vi plifortigos la asocion, kiu laŭstatute reprezentas la indoneziajn esperantistojn ĉe aliaj asocioj kaj instancoj, kaj celas disvastigi Esperanton en Indonezio. Kiel membro vi ricevos membrokarton kaj la duonjara bultenon kaj per ret-mesaĝoj ankaŭ rapide scios pri novaĵoj rilate al Esperanto en kaj ekster Indonezio. Krome, vi rajtas kandidatiĝi por esti reprezentanto de la Asocio ĉe E-aranĝoj en eksterlando.

Jika Anda orang Indonesia dan tertarik dengan bahasa Esperanto, telah belajar atau telah menggunakan bahasa netral ini, ada baiknya Anda pertimbangkan diri Anda menjadi anggota Asosiasi Esperanto Indonesia. Dengan demikian Anda dapat memperkuat asosiasi yang berdasarkan statuta asosiasi adalah perwakilan bagi para penutur bahasa Esperanto Indonesia yang berada di asosiasi atau instansi lainnya; bertujuan untuk menyebarkan bahasa Esperanto di Indonesia. Sebagai anggota, Anda akan mendapatkan kartu anggota, buletin per enam bulan dan mendapatkan informasi cepat yang berhubungan dengan Esperanto baik di dalam maupun di luar negeri melalui e-mail. Selain itu, Anda juga berhak mengajukan diri sebagai wakil asosiasi untuk kegiatan Esperanto di luar negeri.

Berikut adalah keuntungan menjadi anggota IEA:

1. Anggota menerima kartu anggota dan PIN sebagai identitas keanggotaan;
2. Anggota secara rutin menerima buletin "Esperanto en Indonezio" (EEI) yang terbit 2 kali setahun. Koleksi buletin IEA lengkap tersedia situs web IEA www.esperanto.or.id;
3. Anggota berhak menyampaikan artikel, tulisan dan sebagainya untuk memperkaya isi buletin EEI;
4. Anggota berhak untuk mengajukan keanggotaan IEA tak berbayar melalui bantuan Yayasan Asia;
5. Anggota berhak mengajukan diri untuk menjadi wakil IEA di *event* internasional;
6. Anggota berhak hadir pada rapat umum IEA;
7. Anggota berhak mengajukan diri atau memberi suara untuk pemilihan kepengurusan IEA;
8. Anggota diprioritaskan untuk mendapat informasi yang aktual tentang asosiasi dan pergerakan;
9. Anggota berhak untuk ikut serta di Kongres Esperanto Indonesia dan *event* lainnya dengan kondisi khusus;
10. Anggota bisa membeli buku dan barang lainnya dari asosiasi dengan diskon khusus.

Biaya keanggotaan:

Kategori	Biaya
Umum	Rp300.000/tahun
Pelajar/Mahasiswa/Pensiun	Rp250.000/tahun

Pembayaran ditransfer ke:

Bank: Mandiri

Nama: Sondang I.S.D.


Nomor Rekening: 070-00-0479801-8

Bukti dikirim ke iea@esperanto.or.id

Periode Pendaftaran:

Pendaftaran keanggotaan IEA 2017 periode 1 terbuka sampai 30 April 2017.

Ngobrol Bareng Ilia, Yuk!



Ingin melatih bicara Esperanto? Yuk gabung di website IEA www.esperanto.or.id masuk ke menu "Ngobrol Bareng Ilia, Yuk!", masukkan namamu di **Nickname**, klik **Connect** dan mulailah ngobrol. Layanan ini tersedia hari Senin, Rabu dan Jumat pukul 15:00—17:00 WIB.

Selain itu, kamu dapat memperoleh informasi mengenai IEA, gerakan Esperanto di Indonesia, materi belajar Esperanto dan lain sebagainya. Bagi kamu yang memiliki akun *skype* bisa bincang-bincang sambil latihan bicara Esperanto dengan pengurus IEA. Cukup kirim info userID *skype* kamu ke e-mail : iea@esperanto.or.id

Pendaftaran Forum Pemuda Esperantis Indonesia (Forperin)

✉ greschinov@gmail.com

Forum Pemuda Esperantis Indonesia; Forperin atau dalam bahasa Esperanto disebut *Indonezia Esperantista Junulara Organizo* (IEJO) adalah wadah se-Indonesia yang mengakomodasi gerakan pemuda dalam dinamika Esperanto pada lingkup nasional.

Dalam menjalankan organisasi, IEJO berada pada naungan IEA (*Indonezia Esperanto-Asocio*) dan memiliki hubungan kerjasama dengan UEA (*Universala Esperanto-Asocio*; Asosiasi Esperanto Universal) dan TEJO (*Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*; Organisasi Esperantis Muda Dunia) yang berpusat di Rotterdam, Belanda.

Visi: “Menjadikan generasi muda Indonesia berwawasan Esperanto dengan berlandaskan semangat perdamaian dunia.”

Misi:

1. Menyebarluaskan idealisme dan gerakan Esperanto kepada generasi muda Indonesia;
2. Bekerja sama dengan berbagai elemen, baik nasional maupun internasional guna menunjang progresivitas organisasi;
3. Menghapuskan sekat-sekat bahasa antar suku, bangsa, dan ras;
4. Mempromosikan dan menjunjung tinggi kesetaraan komunikasi.

Syarat Kepengurusan:

1. Pemuda berusia kurang dari 30 tahun;
2. Memiliki minat pada bahasa dan gerakan Esperanto;
3. Berdomisili di Jabodetabek atau di Bandung;
4. Menjadi pengurus langsung otomatis menjadi anggota tanpa perlu membayar iuran keanggotaan;
5. Mendaftarkan diri di <http://www.esperanto.or.id/id/pendaftaran-anggota-iejo/>
6. Akan ada sesi wawancara bagi para calon pengurus. Mekanismenya akan diumumkan kemudian.

Kepengurusan yang Dibuka:

1. *Ĝenerala sekretario* (Sekretaris umum), bertugas dalam mengurus administrasi dan arsip-arsip organisasi;
2. *Kasisto* (Bendahara), bertugas dalam mengelola dan mengumpulkan keuangan organisasi;

Erlangga Femayuga @ Bekasi



FORPERIN
FORUM PEMUDA ESPERANTIS INDONESIA
(Indonezia Junulara Esperantista Organizo; IEJO)

**Kamu berminat dengan bahasa Esperanto?
Kamu adalah pemuda di bawah 30 tahun?**

Jika iya, bergabunglah menjadi anggota Forum Pemuda Esperantis Indonesia!

**Daftarkan dirimu di:
bit.ly/forperin**

Info lebih lanjut, hubungi:  EsperantoIndonesia obs8706q  [@bahasaesperanto](http://esperanto.or.id)

3. *Informado* (Humas), bertugas dalam menginformasikan Esperanto dan kegiatan organisasi kepada masyarakat umum;
4. *Edukado* (Pendidikan), bertugas dalam merancang sistem pembelajaran bahasa Esperanto bagi para anggota;
5. *Eksteraj-rilatoj* (Hubungan eksternal), bertugas menjalin komunikasi dengan organisasi-organisasi luar.

Syarat Keanggotaan:

1. Pemuda berusia kurang dari 30 tahun;
2. Memiliki minat pada bahasa dan gerakan Esperanto;
3. Mendaftar diri di <http://www.esperanto.or.id/id/pendaftaran-anggota-iejo/>

Keuntungan Menjadi Anggota IEJO:

1. Terbuka kesempatan dalam menjalin hubungan yang lebih luas dengan Esperantis baik dalam lingkup nasional mau pun global;
2. Terbuka kesempatan dalam mewakili Indonesia dalam kongres Esperanto mancanegara;
3. Mendapatkan berbagai akses dan materi pembelajaran bahasa Esperanto.

Pertanyaan terkait keanggotaan atau kepengurusan IEJO silakan hubungi iea@esperanto.or.id

La Realigitaj Agadoj en 2016 & La Planitaj Agadoj en 2017

✉ ilia.dewi@gmail.com

Ilia Sumilfia Dewi @ Ĝakarto



1. Ĝisdatiĝo de Indonezia Esperanto-Asocio retejo dum 2016;
 2. La Kanaloj de Socia Medio celas por informejo, publikiĝo kaj diskut-forumo de Esperanto kaj Movado dum 2016:
 - Tvitero **@BahasaEsperanto**
 - LINE ĉe **"Esperanto Indonesia"**
 - Fesbuk de **"Esperanto en Indonezio"**
 - Instagram ĉe **esperantoIndonesia**
 3. 23a–28a de Marto, 2016: 1a Trilanda Kongreso en Bandung, Indonezio;
 4. Enkonduko de Esperanto ĉe Universitatoj en Ĝakarto, Indonezio (Univ. Budi Luhur), Aprilo 2016;
 5. Kunlaboro kun amaskomunikiloj kaj intervjuoj pri Esperanto en Televid-stacio je la 21a de Junio, 2016; kaj Radio-elsendoj je la 21a de Septembro, 2016;
 6. 24a de Julio, 2016: E-kampajo kadre de Esperanto-tago en Bekasi, Indonezio;
 7. Skajpkunsido temas pri movado kun Filipinaj kaj Aŭstraliaj samideanoj, Julio 2016;
 8. La Organo de Indonezia Esperanto-Asocio: "Esperanto en Indonezio" duona-jara bulteno;
 9. E-konkursoj kadre de Sendependeca Tago de Indonezio, je la 14a-23a de Augusto, 2016;
 10. Kunsido pri Kunlaboro Kadre de 2a Trilanda Kongreso en 2018 kun E-grupo de Lingva Komunumo, Faktabahasa, Bekasi, 4a de Septembro, 2016;
 11. E-kurso per WhatsApp komenciĝis je la 10a de Oktobro;
 12. Esperanto-budo kun E-grupo de Faktabahasa Bekasi en la Tago de Komunumo je la 1a de Oktobro, 2016;
 13. Partoprenos konkurso de mallongaj filmoj "Teo Kaj Amo" de Ĉina Radio Internacia (ĈRI), Novembro 2016;
 14. Pikniko de Ĝakarta Esperanto Klubo "Esperiga Suno" kaj IEA, Novembro 2016.
-
1. La preparado de 2a Trilanda Kongreso, 2018 komenciĝos en Januro, 2017;
 2. Komenciĝos la 2a periodo de E-kurso per WhatsApp en Januro, 2017;
 3. Instigi aktivulojn por verki Esperanto-vortaron en Indonezia lingvo kaj lerno-materialojn;
 4. Starigi la junularan organizon: IEJO;
 5. Daŭre okazigi E-kampanjon ĉe publika evento en Ĝakarto, Bekasi kaj ĉirkaŭaj urboj;
 6. Kunlaboro kun aliaj najbaraj landoj: Orienta Timoro, Singapuro, Filipino, Tajlando, k.t.p.;
 7. Daŭra kunlaboro kun amaskomunikiloj por propagandi Esperanton;
 8. Okazigi Esperanto-enkondukon ĉe diversaj komunumoj en Ĝakarto, Bekasi kaj ĉirkaŭaj urboj;
 9. Organizi Karavanon al Seŭla UK, Koreio en Julio, 2017;
 10. Kunlabori kun AEA (Aŭstralia Esperanto-Asocio) kaj NZEA (Nov-Zelanda Esperanto-Asocio) kadre de junulara movado, interŝanĝo de E-artikoloj kaj Indonezia reprezentanto al AEA-kongreso en Januro 2017.

Toko Esperanto di Tokopedia

- Apakah kamu cari buku-buku pelajaran Esperanto yang bagus?
- Mau gaya dengan kaos Esperanto yang keren?
- Pengen punya bendera Esperanto?
- Butuh pernak-pernik untuk kampanye Esperanto?

Ayo kunjungi toko online kita! Transaksi yang aman ini bisa kirim langsung ke alamat kamu.



<http://www.tokopedia.com/esperanto>

Korea Mengundang Kita

Suka makanan Korea? Drama Korea? K-pop Korea? Yuk ikutan kita ke Kongres Esperanto Internasional (Universala Kongreso) ke 102 di Seoul, Korea. Di sana kita bisa menikmati keindahan

Korea di sela-sela kegiatan kongres berupa seminar dan pameran Esperanto, pagelaran seni dan jalan ke berbagai kota di Korea bersama penutur Esperanto dari berbagai negara.



Informasi lebih lanjut, hubungi
iea@esperanto.or.id



Por festi la Zamenhofan Tagon je la 15a de Decembro 2016 jen unu de famaj poemoj kiu estis verkita de Zamenhof



En bona hor'! Ni aŭdis la signalon
kaj bataleme saltas nia koro.
Konduku nin, komencu la batalon
sub bona stelo, en feliĉa horo!

Amikoj de proksime, malproksime,
salutas vin, ho nia luma stelo!
Konduku nin, senhalte kaj sentime,
al nia granda, sankta, glora celo!

Ne tre facila estas nia vojo
kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos;
sed batalante, kun plej granda ĝojo
senhalte ni laboros kaj esperos.

For estas jam la baroj de l' komenco,
l' unua muro estas trarompita,
kaj dolĉa estos nia rekompenco,
kiam la celo estos alvenita.

Raporto de “1a Esperanta Pikniko de Esperiga Suno”

✉ ferduzi@aol.com

Arya Ferduzi @ Bekasi



En Novembro, okazis la unua pikniko de la Klubo Esperiga Suno de Ĝakarta. La klubo vojaĝis al la plaĝo de Anyer. La pikniko daŭris dum du tagoj kun dek du partoprenantoj. La unua tago, estis naŭ de ili, kaj la aliaj tri sekvis je la dua tago. Ĉi tio estas la programo kiu estis subtenita de IEA, Indonezia Esperanto Asocio. La pikniko anstataŭigis la monatan kunvenon de la Ĝakarta klubo. Ĝi celis la proksimeco inter la klubanoj kaj IEA. Ĝi okazis ĉe "Hawaii A Club Bali Resort", belega feriejo apud la maro en Anyer.

Antaŭ la pikniko, la partoprenantoj tranoktis ĉe Arman, unu de la klubanoj, por eviti la densa trafiko dum la forveturo al Anyer. La piknikantoj ekveturis je la 7^a horo matene, kaj alvenis tien je la 11^a horo. Post la alveno, ni tagmanĝis antaŭ la malfermo de la programo. Rizki, ĉefo de la Ĝakarta klubo, kaj Ilia, ĉefo de IEA malfermis la programon posttagmeze. Post la malfermo, Ilia rakontis pri sia vojaĝo al Nepalo kaj pri la Esperanto Azia Kongreso.

Post la prelego de Ilia, la piknikantoj ĝuis la akvon en la maro kaj la ĝojigan naĝejon de la feriejo. Ni naĝis, fotis kaj profitis la masaĝan servon de la feriejo. Ĉiuj, ĉefe la infanoj de Arman, la plej junaj klubanoj, tre ĝojas ludi en la akvo.

Vespere, ni spektas la prelegojn de Arman, Sesti kaj Rika. Arman informis al la klubanoj la Morsan kodon. Sesti rakontis pri sia sperto de instrui Esperanton en pensia lernejo. Kaj Rika, edzino de Arman, malkaŝis sian sekreton de la fritita kokaĵo. Ŝia speciala fritita kokaĵo finfine iĝis la bongusta vespermanĝo.

Poste, estis la tempo por la arta vespero. Ĉiuj devis partopreni: ni dancis, kantis kaj eĉ legis poemon. Ĉe la arta vespero ni havis konkurson de danco kies gajnanto estis deklaranta je la sekva tago. Post la arta aprezo, ni havis alian konkurson de

ludi. Estis du ludoj: Telepatio kaj Pictionary. La telepatio postulis la piknikantojn por aŭdi fortegan muzikon per aŭdiloj kaj diveni vortojn aŭ frazojn dum la aŭdo. Pictionary estas fama ludo, sed en ĉi tiu pikniko, ni havas la Esperantan version de la ludo.

Je la dua tago, tri aliaj piknikantoj alvenis al la loko. Kaj ni kune ĝuis la matenmanĝon, kiu estis preparita de Rika kaj Bambang. Denove en la mateno, ni ludis en la naĝejo kaj la maro. Kaj poste, okazis du kunsidoj: de la IEA kaj la Ĝakarta klubo. La kunsidoj daŭris dum unu horo. Antaŭ tagmeze ni diskutis pri la rezultoj de la kunsidoj kaj kunspektis la filmon “Teo, Amo kaj Familio”, kiu partoprenas en la konkurso de la filmo de la Esperanto Azia Asocio. Tagmeze, ni tagmanĝis kaj poste, la gajnantoj de la konkurso de danco, Telepatio kaj Pictionary estis deklarataj. Ankaŭ estis deklarataj, la plej bona esperantisto de la pikniko, kaj la plej malbona (kiu krokodilis la plej multe). La premioj estis donataj al la gajnantoj kaj ni faris komunajn fotojn poste. Je la 13^a horo, ni revenis hejmen kun la memoro de belega pikniko, kaj ĝojiga maro kun la verda etoso.

Detalaj informoj de la pikniko:

Komenco	: Sabato, la 26 ^a de Novembro 2016
Fino	: Dimanĉo, la 27 ^a de Novembro 2016
Loko	: Hawaii A Club Bali Resort, Anyer
Partoprenantoj	: 12 personoj
Organizita de	: Klubo Esperiga Suno de Ĝakarta
Subtenita de	: IEA

🇮🇩 Mia Unua Sperto en La Pikniko de Ĝakarta E-klubo

🇮🇩 *Pengalaman Piknik Pertama Dengan Klub Esperanto JKT*

✉ rika.dyah@gmail.com

Rika Dyan Tanti @ Jakarta



Je la 26a-27a de Novembro, Ĝakarta E-klubo organizis la unuan piknikon ekstere la urbo al Anyer. Tiam mi persone ne certis partopreni la agadon ĉar mi estis tuta novulo kaj ankoraŭ ne multe parolas Esperanton. Tial mi nur komprenas iomete.

Per la granda instigo kaj volo por praktiki Esperanton, mi kuraĝis partopreni. Ĉefe por pli bone lerni kaj kompreni la simplan Esperanton.

Miaj geamikoj de Ĝakarta E-klubo agrable helpis min. Do, mi pli kuraĝis paroli Esperanton kaj prelegis pri la sekretan recepton de mia kuirraĵo.

Mi ekkomprenis iomete kaj ekmemoris kelkajn vortojn de Esperanto pro la piknika agado. Tamen mi ankoraŭ tiom malrapide respondas en konversacio.

Mi ege esperas por pli bone progresi kaj havos ŝancon por

partopreni Esperantajn aranĝojn. Fakte mia ĉefa problemo ke mankas tempon al mi por lerni. Mi malfacile lernas Esperanton ĉar mi estas patrino kiu devas zorgi infanojn kaj aktiva oficistino.

Mi tamen ĝojas ke pro la Esperanta komunumo en Ĝakarta, mi konatiĝis kun novaj amikoj kaj spertis agrablan sperton.

Pada tanggal 26-27 November, klub Esperanto Jakarta mengadakan piknik pertama keluar kota yaitu ke Anyer.

Saat itu, saya secara pribadi ragu untuk mengikuti acara tersebut karena saya masih sangat pemula untuk berbicara dengan bahasa Esperanto dan minim mengartikan bahasa Esperanto ke dalam bahasa Indonesia.

Berbekal dengan niat belajar yang besar dan ketekatan untuk mempraktekkan bahasa Esperanto, saya pun memberanikan diri untuk ikut serta. Tujuan utama saya dalam mengikuti piknik ini adalah belajar mengerti bahasa Esperanto yang sederhana.

Teman-teman Esperanto klub Jakarta ternyata sangat kooperatif dan seru sehingga saya pun mulai berani berbicara bahasa Esperanto dengan memberikan presentasi singkat mengenai resep rahasia masakan.

Saya mulai mengerti dan menghafal sedikit kata-kata dalam Esperanto dari kegiatan piknik tersebut walaupun ketika membalas percakapan masih sangat terbata-bata.

Besar keinginan saya untuk mempelajari lebih lanjut dan ikut dalam kongres-kongres Esperanto. Namun kendala terbesar saya adalah waktu belajar. Sulit buat saya untuk fokus belajar bahasa Esperanto dimana saya juga harus berfokus terhadap tanggungjawab saya sebagai ibu dan juga wanita bekerja.

Namun saya senang melalui komunitas Esperanto Jakarta saya mendapat teman-teman baru dan pengalaman seru.

Ayo selalu kunjungi situs kita untuk mendapat informasi terkini...



<http://www.esperanto.or.id/>

★ Mia Esperanta Pikniko al Anyer

✉ ferduzi@aol.com

Arya Ferduzi @ Bekasi

Mi komencis la piknikon kun konfuzo ĉar mi ne certis pri la ekiro. Sed finfine mi povis prepari por tute partopreni en la pikniko.

Ni devis unue tranokti ĉe S-ro Arman, ĉar ni volis eviti la densan trafikon tien. Kaj, estis efike! Ĉar ni renkontis senobstaklan trafikon. Ni atingis la lokon je la 11a kaj ni preparis ĉiujn aferojn por nia pikniko kaj niaj agadoj. Poste ni malfermis la programon antaŭ S-ino Ilia havis sian prelegon. Ŝi parolis pri sia afabla vojaĝo en Ĉinio kaj Nepalo.

Poste, ni naĝis en la akvo (la naĝejo kaj la maro). Estis bele! La loko estas apud la maro. Ĝi ne povas esti pli bela. Post ke ni ĝuis la akvon, ni havis prelegojn de S-ro Arman, F-ino Sesti kaj Rika. Ili diskonigis gravajn informojn kaj la spertojn al ni.

Je la 7a horo vespere, estis la tempo por la arta vespero. Ni dancis, kantis kaj ĝuis la poemon. Estas afable por havi artan



aktivaĵon kun la verda etoso. Kaj je la 9a horo vespere, ni ludis kelkajn ludojn: Telepatio kaj Pictionary. Mi fakte preparis kvin ludojn, sed la piknikantoj ĝojegis ludi Esperantan version de Pictionary. Kaj fine, ni ludis ĝin ĝis la preskaŭ nokta mezo.

La sekvan tagon, niaj aliaj geamikoj alvenis al la loko. La piknikantoj multiĝis! Matene ni naĝis kune kun la afabla etoso de Anyer. Poste, ni havis du kunsidojn: ties de la IEA kaj ties de la Esperiga Suno, Esperanta klubo de Ĝakarto. Ni diskutis pri gravaj aferoj de niaj organizaĵoj.

Antaŭ reveni hejmen, ni kunspektis la filmon "Teo, Amo kaj Familio". Ĉi tiu filmo partoprenas al la konkurso de filmeto de ĈRI (Ĉina Radio Internacia) en Ĉinio. Kaj post la filmo, ni faris komunan foton apud la maro kaj belaĵo. Finfine, ni revenis hejmen esperante la sekvan piknikon.

★ La Esperanta Pikniko en Anyer

✉ greschinov@gmail.com

Erlangga Femayuga @ Bekasi

Unue mi sentis ĝojon kiam aŭdis pri la pikniko de Esperantistoj en la 26-27a Novembro. Malgraŭ en la unua tago de la pikniko mi devis esti en Bandung por fari la ekzamenon, sed la lasta tago estis bonega kaj plenspirita.

Mi iris tie ĉe matene, en la dimanĉo, kun Lio kaj Eko. La vojaĝo estis sufiĉe rapida ĉar oni bezonis nur du horojn de la vojaĝo el Bekasi al Anyer. Tiam oni ĵus venis en la loko, la Esperantistoj tie bonvenigis nin kaj invitis nin por la matenmanĝo, kiu estis tre bongusta. Dankon por Rika kaj Rizki, kiuj preparis ĝin! :-)

Post tiam, mi promenis sur la plaĝo kaj naĝis en la naĝejo. La atmosfero tie estis bona, sed la glitilo estis malbone glitiga kaj kiam mi provis ĝin, mi multfoje haltis en la glitilo. Post la naĝo, mi banis min kaj preparis por la kunsido de IEA. Tiam oni diskutis multajn aspektojn pri la agadoj kaj oni

malproksimiĝis al la fino; oni tagmanĝis kaj kune spektis la filmon "Teo, Familio, kaj Amo".

Post kelkaj minutoj, oni eliris de la hotelo kaj faris la fotojn, adiaŭis unu la alian kaj returnis al Ĝakarto.

Mi bone ĝuis la piknikon kaj mi esperas ke estos la sama pikniko estontece.



Esperanta Zono, Kiel Mojosa!

Zona Esperanto, Keren Lho!

✉ bambangprianono_baru@yahoo.co.id

Bambang Priantono @ Tangerang



Unu de aferoj de E-Pikniko kiu memorindis por mi estas la Esperanta Zono. Kie ni devis uzi Esperanton, flue aŭ malflue. Mem mi estis konfuzita al la komenco, ĉar jam longtempe mi ne parolis Esperanton kaj nur komunikis Esperante en la grupo de WA. Tamen, la celo de la pikniko estis Esperanto. La loko por la zono estis la salono de nia tranoktoloko. Tie oni povis trovi kuirejon, sofojn, manĝotablon kaj televidilon. Tie ni kunsidis, diskutis kaj faris diversajn aktivaĵojn kiu rilatas al Esperanto.

La plej strikta regulo de la zono estis: Tiu kiu krokodilis, estis akironta bluan "moneron" kiel koliera pendaĵo; unu "monero" po unufojo de krokodili, krom kiam ni parolis al la infanoj kiu iomete komprenis Esperante. Tio faris nin multfoje senvorta. Sed kiam mi forgesis la Esperantajn vortojn, miaj poŝtelefonaj Esperantaj aplikaĵoj helpis min.

Tute, mi havis du "monerojn", la unua estis por la sesio de prezentado kaj la alia estas por la Arta Vespero kiam mi diris "aduh" senintence. Aliaj inkludante Ilia kaj Sesti havis pli ol mi. Sed, mi ne sciis ke tiu kun la plej multaj "moneroj" estis ricevonta premion; Sesti, ŝi havis sep "monerojn" kaj ricevis premion. Ankaŭ Arman ricevis premion por esti la persono kun la plej malmultaj "moneroj" kaj li provis paroli bone Esperanton.

Esperanta Zono estis bona. Estis multe da amuzaĵoj, seriozaĵoj kaj ŝercaĵoj tie. Ĝi estis la ujo por profundigi kaj ekzercigi nian Esperantan interbabilkapablon. En la estonteco, havindos pli da prezentadoj Esperante kun pli interesaj kaj defiaj temoj. La prezentado devos esti komunika, do ĉiu povos partopreni.

Esperanta Zono estas mojosa!

Salah satu bagian dari E-Pikniko yang mengesankan bagi saya adalah dengan adanya Esperante Zono alias Zona berbahasa Esperanto, dimana dalam ruang tersebut kita diwajibkan menggunakan bahasa Esperanto, baik lancar maupun tidak lancar. Saya sendiri awalnya bingung juga, karena sudah lama tidak berbicara bahasa Esperanto dan hanya berkomunikasi lewat grup WA. Oke, sebagaimana yang diatur sebelumnya, Piknik kali ini diutamakan berbahasa Esperanto, dan tempat yang dipilih adalah ruang tengah tempat kami menginap, yang terdiri dari dapur, sofa, meja makan dan televisi. Disitu kami berkumpul, berdiskusi, dan melakukan aneka macam kegiatan yang terkait ke-esperanto-an.

Dan aturan yang paling tegas adalah, barang siapa yang melanggar dengan mengucapkan bahasa lain selain Esperanto, maka dia akan mendapat koin biru yang dikalungkan. Semakin sering melanggar baik sengaja maupun tidak sengaja (kecuali ketika berbicara dengan anak-anak), maka koin yang didapat semakin banyak. Yang membuat sebagian kita banyak diam, dan kalau saya bingung apa bahasa Esperantonya, maka aplikasi elektronik bahasa Esperanto yang ada di Hplah yang jadi senjata penyelamat.

Total jenderal ada dua koin yang saya dapat, pertama saat sesi presentasi dan saat Vespero Arto dimana saya tanpa sengaja bilang 'aduh', dan kedengaran oleh yang lain. Jadilah kalung dua. Beberapa termasuk Ilia, Sesti dan lain-lain juga dapat koin banyak. Tapi ternyata biarpun dapat koin tetap mendapat hadiah, karena Sesti yang paling banyak mendapat koin (sebanyak tujuh koin), maka dia mendapat hadiah. Sementara Arman juga mendapat hadiah karena dia yang paling minim kesalahannya dan berusaha berbicara bahasa Esperanto dengan baik.

Esperante Zono memang bagus. Banyak kelucuan, keseriusan sekaligus kekonyolan didalamnya. Esperante Zono sekali lagi adalah sebagai sarana memperdalam dan melatih kemampuan bercakap-cakap dalam bahasa Esperanto. Di masa mendatang, perlu lebih sering diadakan presentasi dalam bahasa Esperanto dengan topik yang menarik sekaligus menantang, serta komunikatif, sehingga semuanya turut terlibat.

Zona Esperanto, keren lho!

Vojaĝo kun Esperanto al Ĉinio kaj Nepalo

✉ ilia.dewi@gmail.com

Ilia Sumilfia Dewi @ Ĝakarto



Post partopreni la 8an Azian Kongreson, mi aranĝis vojaĝon al aliaj urboj en Ĉinio. Per rapida trajno mi veturis de Quanzhou al Hangzhou ĉirkaŭ 6 horoj kaj alvenis vespere. Mi ĝojis ĉar mia E-amikino, Ĉielia jam atendis kaj bonvenigis min en la stacidomo kaj tiam estis nia unua renkontiĝo. Ŝi estas afabla junulino kiu laboras en la universitato de Zhejiang kaj ĵus translokiĝis al la urbo de Hangzhou antaŭ kvar monatoj. Antaŭ mia vizito ni jam interkonsentis ke ŝi gastigu min ĉe sia ĉambro kiu estis disponita de universitato.

Tiu vespero mi ankaŭ konatiĝis kun alia juna esperantisto kiu nelonge lernis la lingvon. Ni kune havis agrablan vespermanĝon kvankam la vetero estis sufiĉe malvarme kaj pluvis dum la tuta tago.

Pro sia laboro, Ĉielia ne havis eblecon por akompani min kaj demandis al s-ro Lou kiu iam lernis Esperanton sed prefere komunikis per Angla lingvo kun mi. Matene ni vizitis la okcidentan lagon aŭ Angle konata kiel "West Lake". Por atingi tiun belan lagon ni unue devas veturi per buso kaj poste promeni al la haveneto por preni boaton. Oni veturis per boato ĉirkaŭ 20 minutoj al la insuleto kiu troviĝas en la mezo de lago. Multaj vidindaĵoj troviĝas en la insuleto ekz. pagoda, floroj, ktp. kaj samtempe oni povus ĝui la freŝan venton kiu blovis. Je la unua horo posttagmeze ni havis tagmanĝon de ĉinaj tradiciaj manĝaĵoj kiujn mi neniam manĝis sed ili estis tiom bongustaj.

Vespere mi devis adiaŭi Ĉielia en la stacidomo por daŭrigi la vojaĝon al Ŝanhajo. Mi prenis normalan trajnon kaj konektis per metroo por alveni en la urbo centro kiu estis konsilita de s-ro Saed. Li estas Irana esperantisto kiun mi renkontis en Azia kongreso kaj jam antaŭlonge loĝas en Ŝanhajo. Dum mia mallonga vizito, s-ro Saed helpis kaj akompanis min por rigardi la urbon kaj siajn unikaĵojn ekzemple pri fama Ĉina verkisto Lusin kiu verkis kaj tradukis librojn al Esperanto. Mi ankaŭ trovis interesan aferon kiam ni vizitis la ĝardenon de Lusin. Multaj maljunuloj kunvenis kaj agrable faris diversajn agadojn kiel danci, kanti, ludi muzikon, sporti kaj tiel plu. Ili ankaŭ faris simplan reklamon por serĉi edzon aŭ edzinon por siaj genepoj, interese! Krom tio ni ankaŭ vizitis la nacian muzeon kiu havas multajn valorajn kolektojn pri kulturo kaj historio. En la vespero ni kune vespermanĝis kun alia esperantisto kiu nomiĝas Maro kaj sia edzino kaj post tiam mi devus daŭrigi mian vojaĝon per nokta trajno al Pekino.

Mi alvenis en la mateno ĉirkaŭ 9a horo kaj renkontis s-ro Fortego-n, la maljunan esperantiston en la stacidomo. Li afable bonvenigis kaj akompanis min al "Tiananmen Square" kiu estas konata kiel la plej larĝa korto kun multaj historiaj konstruaĵoj ĉirkaŭe. Ene mi vizitis belan ĝardenon kun multaj arboj de kiuj la folioj bruniĝas kaj falis pro la aŭtuno, ege bela pejzaĝo.

Post la vizito ni renkontis kun Ĝoja kiu laboras en ĈRI (Ĉina Radio Internacia) ĉe iu restoracio kaj





kune tagmanĝis. Dum mia restado en Pekino, ŝi gastigis min ĉe sia agrabla domo. En la sekvonta tago mi devus vekigi tiom frue por pretigi la vojaĝon al granda muro, Badailing per matena trajno.

Kiam Ĝoja aĉetis la bileton subite ŝi konatiĝis kun du ĉinaj knabinoj kiuj ankaŭ volis viziti la muron. Ili estis afablaj sed bedaŭrinde ni iom malfacile interkomunikis kvankam unu de ili iomete komprenis Angle. Je la 10a horo matene ni alvenis kaj komencis grimpi la muron de norda pordo. Ni bone pasigis la tempon kvankam la vetero estis tiom malvarme ĉirkaŭ 5 gradoj kaj faris multe da fotoj survoje al la pinto de la muro. Post 2 horoj kaj duono, ni atingis la pinton kaj fiere fotiĝis kun medalo kiun oni povis mendi ĉirkaŭ la muro. Posttagmeze mi forlasis la muron kaj revenis al la urbo per trajno. Antaŭ foriri al la flughaveno por daŭrigi vojaĝon al Nepalo, mi havis agrablan vespermanĝon kun Ĝoja kaj aliaj pekinaj esperantistoj kiel adiaŭa vespero. Mia flugo foriris je la 3a horo matene de Pekino al Kuala Lumpur kaj poste al Kathmanduo.

Je la 12a de Novembro, mi sekure alvenis ĉe Tribhuvan internacia flughaveno kaj tuj aranĝis la vizon por eniri la landon. Post la burokratia procezo, mi trovis pardonon por eliri de flughaveno kaj komencis serĉi la amikinon, Indu kiu jam sufiĉe longe atendis min pro la malfruo de flugo. Ŝi unue gvidis min por iri al sia hejmo kien mi tranoktis dum la vojaĝo en Kathmanduo kaj veturis al Esperanta domo de Nespa (Nepala Esperanto-Asocio).

Feliĉe mi renkontis kelkajn malnovajn geamikojn kun

eksterlandaj gastoj kiuj vizitis la domon por propagandi iun agadon rilate al meditado. Poste Indu kaj s-ro Prakash gvidis min por viziti la reĝan palacon kaj ĝia unika templo kiu troviĝas proksime de E-domo.

Dum mia restado en Kathmanduo mi spertis multajn unikajn aferojn rilate al la loka kulturo, manĝaĵoj, publika veturilo kaj la Nepalanoj. Ĉiu aspekto riĉigas mian scion kaj donis belan sperton ekzemple pri la boneco de Nepalanoj. Kiam oni vizitas ies domon, ili servas la gaston kun multaj manĝaĵoj por kontentigi lin aŭ ŝin tial la domestro ankaŭ kontentiĝas. Mi ankaŭ vidis multajn belajn templojn kaj stupojn ĉirkaŭ la urbo kien la lokanoj preĝas kaj faras aktivecojn rilate al la religio. Krom Kathmanduo mi ankaŭ vizitis alian belan urbon, Pokhara por vidi la belecon de Himalaya montaro. Mi prenis buson kiu veturis matene por alveni posttagmeze je la 4a horo vespere. En la busterminalo mi renkontis esperantiston kiu afable bonvenigis min, s-ro Him Lal. Li helpis min por iri al la hotelo kiu troviĝas sur la monteto per taksio kaj invitis manĝi la lokan manĝeton "momo" kiu iom similas ĉinan manĝaĵon. Alia bela loko kiun mi vizitis estas "Phewa Lago". Tie oni povas mendi boaton por trarigardi la lagon kaj ĝui la belan pejzaĝon ĉirkaŭe.

Mi ankoraŭ restis du noktoj en Kathmanduo antaŭ forflugi al Indonezio je la 19an de Novembro tra Kuala Lumpur.

Tiu ĉi lasta vojaĝo jam donis al mi la belan sperton kun esperantistoj kiuj jam multe helpis plifortigi la familian senton de verda komunumo.



La Eta Rakonto el Jogjakarto


✉ ardiantidewi36@yahoo.co.id

Ardianti @ Jogjakarto

Post kelkaj jaroj de malapero de la Esperanta Grupo en Jogjakarto, ĝi renaskiĝis denove en la komenco de 2014 ĉar unu Hispanjo volonte rekomencis Esperantan kurson en unu de universitatoj en Jogjakarto. Ĝi havis tutnovajn membrojn. Bedaŭrinde en la fino de 2015 Jogjakarta E-grupo malaktivis denove ĉar plejparte de la anoj estis studentoj kiuj devis reveni al siaj urboj post ili diplomiĝis. Unu tago en la mezo de 2016 okazis diskuton inter novaj kaj malnovaj anoj, ni preparolis rekomenci Esperantan kunvenon por ke Jogjakarto E-klubo povus esti aktiviĝa kaj revivita. Ĉiuj anoj entuziasmis aŭdi ke ni povas disvastigi kaj plibonigi nian esperanton per interbabili kaj fari multajn agadojn en la grupo. Lastatempe la kunveno okazis unufoje po monato. Ĉi Oktobro devus esti la tria kunveno de Jogjakarta esperanta grupo. La specialan aferon kiu havas Jogjan E-grupon estas la amikema etoso.

Neniam estas tre formala, ni kutime rakontis ion esperante per ŝercoj kaj "malpezaj" temoj, eĉ ni kelkfoje babilas pri privataj aferoj ŝerce.

Konstantan lokon ni ne havas por kunveni. La loko povus esti en universitato aŭ kafejo aŭ supermerkato aŭ vendejo. En la lasta kunveno ni renkontis en la domo de unu el la anoj. Festis ni en tiu freŝdata kunveno, ni fajrkuiris maizojn, kokaĵojn, legomojn, rizon, saŭcon, majonezon, margarinon. Ni faris citrusukon kiel trinkaĵo. Samtempe ni preparolis kelkajn aferojn kiel gramatiko de esperanto kaj sperton pri la kialo eklerni esperanton ĉar nia grupo havis novan anon tiu tage. La alia interesa afero en Jogjakarta E-grupo estas ke preskaŭ ĉiuj anoj ankaŭ interesiĝas lerni aliajn lingvojn do ni ankaŭ ofte parolis pri aliaj lingvoj esperante. Estontajn agadojn ankaŭ ni preparolis. La temo kiu precipe





estis preparolata estis plano kaj deziro por funkciigi esperanton al alia afero krom por vojaĝo kiel socio kaj komerco kaj interŝanĝi la kulturojn. Tio deziro aperigis ĉar kiam ni propagandis esperanton al niaj geamikoj aŭ aliaj homoj, la plej ofta demando estas “kio estas la avantaĝoj lerni esperanton?”. Kutime ni respondis: “por fari amikecon kaj por vojaĝi” sed tiu respondo verŝajne ne sufiĉas allogi ilin. Ni supozas ke ni bezonus pli taŭgan respondon por allogi ilin eklerni esperanton. Nu, ni provas trovi la funkciojn de esperanto en aliaj aferoj.



★ Vi Ne Bezonas Lerni Tuton!

[f] [facebook.com/teddynee](https://www.facebook.com/teddynee)

Teddy Nee @ Taiwan

Saluton! Mia nomo estas Teddy Nee. Tiu ĉi momente mi loĝas ĉe Tajvano. Kiam mi havas liberan tempon, mi ŝatas legi librojn, babili kaj skribi en diversaj lingvoj. Mia revo estas ke oni povu plibonigi ĉi tiun mondon per lingvoj. Do, mi volas eduki homojn pri la graveco de lingvoj. Mia angla kaj ĉefa blogo estas Nee's Language Blog <http://www.neeslanguageblog.com/> Mia esperanto-blogo estas Nia Lingvo <http://www.nialingvo.wordpress.com>

Unu tage mi estis petita por fari prezentadon, kaj la temo estis “Kiel oni povas solvi problemojn pri manko de motivo en lingvolernado?” Ĝi koncernas la aferon, kion oni povas fari kiam oni jam ne havas pli motivon por lerni la lingvon ĉar oni sentas ke la plibonigado mankas.

Mi ankoraŭ ne akceptis la proponon ĉar mi ĝis nuntempe ankoraŭ pensas kiel oni povas solvi tiun problemon. Mi povas daŭrigi mian lernadon ĉar mi kredas je la avantaĝo de scii multajn lingvojn. Sed kiel mi povas havi tiun kredon? Mi pensas.

Ĉiuj lernantoj lernas malsame kaj mi pensas ke ili povas serĉi siajn proprajn lernmetodojn. Mi ne povas diri ke mia metodo estas la plej bona aŭ ĝusta. Tamen, mi trovis solvon post miaj kelktagoj de esplorado: Vi ne bezonas lerni tuton!

Plej ofte uzataj frazoj


“Ĉu?” eble vi demandus. Se vi pensas plu, vi rimarkos ke ni ĉiam ripetas frazojn en nia interparolado. Ekz. ni ofte demandas “kie vi estas?”, “kial ĝi estas tiel?”, ktp. Pensu pri frazoj, kiujn vi ofte uzas ĉiutage. Tiuj frazoj estos viaj unuaj frazoj por lerni en la lingvo, kiun vi estas lernanta.

Se vi konas anglan, ĉi tiu estas unu ekzemplo pri la plej uzataj vortoj en angla lingvo. https://en.wikipedia.org/wiki/Most_common_words_in_English Tiu okaze, vi povas ankaŭ traduki tiujn vortojn al via celloĝo kaj faras ekzemplojn per tiuj vortoj.

Gramatikaj satuloj

De mia sperto en lingvolernado, mi jam konis kelkajn homojn, kiuj ŝatas lerni gramatikon aŭ fari esploradon pri ĝi. Mi certe ne estas tia persono, kvankam mi scias ke mi vere bezonas bonan konon pri gramatiko por ke mi povu skribi bone. Nu, mi lernas gramatikon laste, post la plej uzataj frazoj.

Estus pli bone se vi komprenas kion signifas “substantivo”, “adjektivo”, “verbo”, “prepozicio”,





ktp., ĉar la kono de ili povas helpi vin por lerni pli rapide. Kiam mi lernis germanan en altnivela lernejo, mi ne komprenis tion, kion akuzativo signifas. Ĝis la momento kiam mi lernis esperanton, mi ekkomprenis sian signifon kaj sian rolon en frazoj.

Tim Ferriss, kiu estas fama aŭtoro kaj ankaŭ poligloto, kreis sian propran sistemon de lernado. Li kreis 8 frazojn, kiujn oni povas lerni unue por ke oni povu scii la gramatikan sistemon de la lingvo. En la angla, la 8 frazoj estas:

- The apple is red.
- It is John's apple.
- I give John the apple.
- We give him the apple.
- He gives it to John.
- She gives it to him.
- I must give it to him.
- I want to give it to her.

Provu ĝin! :-)

Esperanta Kurso per WhatsApp

✉ ilia.dewi@gmail.com


Unu de konataj apoj kiuj oni kutime uzas por komuniki estas "WhatsApp". Ĝi ankaŭ vaste uzata en Indonezio por interŝanĝi informojn aŭ novaĵon inter la uzantoj en la grupo. Pro sia populareco mi havis ideon por krei Esperanto-kurson per WhatsApp kies celoj por gvidi novajn lernantojn kaj disponigi informojn pri movado.

Mi unue aranĝis la metodojn de lernado kaj la regulojn por partopreni la kurson. Poste mi preparis la anoncon kaj publikigis ĝin en la sociaj medioj por inviti ĉiujn kiuj ŝatus aliĝi al la kurso. Por tiu unua periodo mi nur akceptis 15 partoprenantoj kiuj plejparte estas komencantoj. Ili devenas de diversaj urboj eĉ unu loĝas en urbo Perth, Aŭstralio pro sia studo.

Antaŭ la komenco de kurso, Mi kreis la grupon ĉe WhatsApp kaj invitis la kursanojn laŭ siaj telefonnumeroj. Poste mi detale informis la regulojn kaj kiel maniere oni sekvas la lecionojn. Ĉiuj kiuj jam aliĝis havis alfabetan kodon de siaj nomoj por faciligi la komunikadon en la grupo kaj bone rimarki ilin.

En ĉiuj sesioj mi aranĝis tri partojn kiuj estas lecionoj, demandoj kaj taskoj. Ĉe unua parto mi klarigas la lecionon kaj donas ekzemplojn de frazoj. Poste la kursanoj havis eblecon por demandi aŭ peti pli da klarigoj kaj antaŭ la fino de kurso,

Ilia Sumilfia Dewi @ Ĝakarto



mi donis taskojn. Tiu ĉi kurso okazas ĉiutage komence je la 8a horo vespere ĝis la 9a. Se la tempo de kurso finiĝus, la kursanoj rajtas kontakti min por praktiki la lingvon aŭ peti informojn.

Ni utiligas skriban kaj voĉmesaĝon de WhatsApp por komuniki kaj kunlerni en nia grupo kvankam foje okazis malbonan retan konekton inter kursanoj. Tiu ĉi Esperanto-kurso okazas por du monatoj kaj espereble tiam la kursanoj jam pli bone komprenas la bazan lecionon de Esperanto.



Memoru/Ingat, ya...

Zamenhof-Tago

Hari Esperanto



Dankon, Onklo Julius

Anna Löwenstein

La homo, kiun mi devas danki pro mia esperantistiĝo, estas mia praonklo, Julius Löwenstein. Fakte, mi neniam renkontis lin; li mortis antaŭ mia naskiĝo. La nazioj venis al lia hejmo iun matenon tre frue kaj forkondukis lin kiel judon.

Mi aŭdis pri mia praonklo Julius de mia patro, kiu memoris lin kun granda amo. Li estis homo kun multaj intereso, kaj inter tiuj intereso estis Esperanto. La familio loĝis en Nurenbergo, do certe li multe aŭdis pri la lingvo dum la Universala Kongreso de 1923, kiu estis unu el la plej grandaj kongresoj en la historio de la movado. Tial li entuziasmiĝis – sed ĉu li mem lernis la lingvon? Fakte, mi ne scias, ĉu li vere estis esperantisto.

Mi decidis lerni Esperanton, kiam mi havis 13 jarojn. En mia lernejo oni kutime ekstudis la francan en la unua klaso (je 11 jaroj), kaj la latinan en la dua. Por ni anglalingvanoj, la franca prezentis plurajn eksterordinarajn novaĵojn, precipe la konceptojn pri gramatika genro kaj pri verbaj konjugacioj. La angla, same kiel Esperanto, kutime ne havas genrojn, do la instruistino devis klarigi al ni, ke en la franca “libro” estas vira, dum “seĝo” estas ina – tio ŝajnis al ni infanoj tre stranga, kaj ankaŭ iom amuza! Krome la verboj en la angla estas tiel simplaj, ke anglalingvaj infanoj lernas ilin nature kaj ne bezonas studi ilin en la lernejo. Do ni tre surpriziĝis pro la malkovro, ke en la franca estas aparta verbo-finaĵo por ĉiu pronomo.

Kaj krome estis la neregulaj verboj. Ne sufiĉas en la franca, ke ĉiu pronomo havas sian propran finaĵon; ĉe multaj verboj tiuj finaĵoj ne sekvas la regulojn, tiel ke necesas lerni ilin aparte. Post ĉiu leciono de la franca ni iris hejmen kun du aŭ tri novaj verboj, kiujn ni devis lerni parkere. Tial okazis, ke iun vesperon mi demandis min, “Ĉu ne eblus lerni lingvon, kiu ne havas neregulajn verbojn?” Kaj kompreneble mi tuj sciis la respondon, kiun mi jam aŭdis de mia patro: Esperanto.

Mi iris al la publika biblioteko, kaj tie trovis la libron Teach Yourself Esperanto (“Instruu al vi mem Esperanton”). Por homo, kiu jam studis la francan kaj la latinan, Esperanto estis evidente tre facila. Mi tralegis la unuajn lecionojn senprobleme, kaj rapide progresis. Fakte, mi eĉ tro rapide progresis: la lingvo estis tiel facila, ke mi ne ĝenis min lerni parkere la novajn vortojn, kiuj aperis en ĉiu ĉapitro. Tial mi ne memoris ilin precize kaj ne povis bone fari la ekzercojn, kiuj troviĝis en la libro. La sekvo estis, ke post sep-ok ĉapitroj mi enuis kaj reportis la libron al la biblioteko.

Sed evidente la intereso restis, ĉar post kelkaj monatoj mi



decidis provi denove. Mi re-pruntis la libron, kaj ĉi-foje mi studis ĝin pli serioze, lernante parkere ĉiujn novajn vortojn, same kiel mi farus en la lernejo. Sekve, ĉi-foje mi finis la kurson.

En la fino de la libro aperis la adreso de Brita Esperanto-Asocio. Kvankam mi havis tre malmulte da mono, mi skribis al BEA kaj membriĝis. Mi ankaŭ elektis el ĝia katalogo facilan legolibron kaj la plej malmultekostan vortareton. La libron mi povis legi senprobleme, sed la revuo de BEA estis pli malfacila. Multaj vortoj ne troviĝis en mia malgranda vortaro; mi memoras, ke aparte mistera por mi estis la vorto samideano. Mi ne sukcesis kompreni, ke temas pri sam-ide-ano “membro de la sama ideo” (alivorte, esperantisto).

Eĉ pli malfacila estis Kial ne? la revuo de Junularo Esperantista Brita, kiu havis tre aventureman lingvo-uzon, absolute ne kompreneblan por komencanto. Mi tamen vidis en ĝi anoncon pri junulara semajnfino proksima al Londono, kaj iom nerve veturis al ĝi. Mi estis nur 15-jara, kaj neniam antaŭe iris sola al tia aranĝo. Kiam mi





alvenis, mi miris, ke la plejmultaj de la partoprenantoj havas pli ol 20 jarojn, kaj kelkaj eĉ atingis 30! Al mi, tio tute ne ŝajnis juna! Bonŝance, estis ankaŭ pluraj lernejoj, samaĝaj kiel mi. Mi ĝuis la semajnfinojn, kaj konstatis, ke mi bone komprenas ĉion. Bedaŭrinde, mi estis tro timema por mem provi paroli en Esperanto.

Kvankam mi loĝis en Londono, por viziti la plej proksiman Esperanto-klubon mi devis veturi pli ol unu horon per tri aŭtobusoj. Kaj kiam mi alvenis, mi trovis tute malgrandan grupon da homoj, multe pli aĝaj ol tiuj ĉe la junulara renkontiĝo. Ili ĉiam entuziasme salutis unu la alian en Esperanto – sed post la salutoj ili simple daŭrigis en la angla. Mi ne malkuraĝiĝis, kaj eĉ pluiris dum kelkaj monatoj, sed en la fino mi rezignis, precipe ĉar mi devis prepariĝi por lernejaj ekzamenoj.

Post tio mi fakte rezignis pri Esperanto dum pluraj jaroj. Sed la semo restis kaŝita kaj de tempo al tempo donis etan vivosignon. Mia esperantista vivo vere komenciĝis kiam mi loĝis dum kelkaj jaroj en Israelo, kie mi vizitis la lokan klubon en Tel-Avivo. Tie mi trovis grandan kaj vigan grupon, kie la homoj vere paroladis inter si en Esperanto, kaj kun tre aktiva junulara sekcio. Inter ili mi renkontis junulinon, kiu estas ankoraŭ unu el miaj plej bonaj amikinoj, kaj estis ŝi, kiu montris al mi malgrandan anoncon en revuo Esperanto pri

volontula posteno en la Centra Oficejo de UEA (Universala Esperanto-Asocio) en Roterdamo.

Tiel, dek tri jarojn post kiam mi unue serĉis la libron de Esperanto en la loka biblioteko, mi fariĝis aktiva en la Esperanto-movado. Kion pensus mia praonklo Julius, se li sciis, ke lia pranevino edziniĝis al esperantisto, parolas la lingvon kun sia familio, kaj mem verkas en ĝi librojn kaj artikolojn?

Anonceto



Post konsideri kandidatiĝon de kelkaj aktivuloj, IEA decidis ke **Erlangga Femayuga** kaj **Rizki Maulana** indas reprezenti Indonezion al Aŭstralia Esperanto-kongreso kiu okazos je la 6a-15a de Januaro 2017. Gratulon al ili ambaŭ!

Postskribo

ESPERANTO EN INDONEZIO estas neregula bulteno por la indoneziaj esperantistoj kaj iliaj amikoj. Ĝin redaktas teamo de volontuloj kaj ĝi aperas danke al la kontribuoj de indoneziaj kaj alilandaj kunlaborantoj kaj al la donacemo de malavaraj subtenantoj. Nek la redaktantoj nek la kunlaborantoj ricevas ajnan rekompencan pro sia laboro. Al ĝi povas kontribui kiu ajn, se la kontribuado konformas kun la celoj de la bulteno.

Por havi kiel eble plej kvalitan bultenon kaj por faciligi la laboron de la redaktantoj, ni petas niajn kunlaborantojn atente legi la sekvajn sugestojn/petojn kaj sekvi ilin.


- Akcepteblas tekstoj nur en Esperanto kaj la Indonezia lingvo;
- Prefere verku nelongajn tekstojn en unu el la lingvoj menciitaj ĉi-supre kaj aldonu al ĝi resumon, maksimume centvortan, en la alia lingvo;
- Antaŭ ol sendi la tekstojn, nepre kontroligu ilin pere de aliaj (pli spertaj) kolegoj. Tio povas okazi kadre de Esperanta kunveno aŭ leciono, aŭ rete. La tekstoj estu kiel

Tulisan Penutup

ESPERANTO EN INDONEZIO adalah buletin bebas untuk esperantis Indonesia dan kawan-kawan. Adalah para relawan yang mengerjakannya, buletin ini dapat terbit berkat kontributor dalam dan luar negeri serta para donatur yang dermawan. Tim redaksi mau pun kontributor tidak menerima kompensasi apapun atas kerja mereka. Siapa pun dapat berkontribusi, asalkan selaras dengan tujuan buletin ini.

Agar buletin dapat dibuat dengan kualitas terbaik serta memudahkan pekerjaan redaktur, mohon para kontributor membaca saran/petunjuk dengan teliti dan mematuinya.

- Redaksi menerima tulisan berbahasa Esperanto dan Indonesia;
- Ada baiknya menulis tulisan singkat dalam salah satu bahasa yang disebutkan di atas, dan berikan ringkasan (maksimum 100 kata) dalam bahasa satunya lagi;
- Sebelum mengirim tulisan, sebaiknya periksa tulisan bersama orang yang lebih berpengalaman. Lakukanlah di pertemuan





eble plej seneraraj kaj en bona stilo;

- Bonvolu sendi la tekstojn en redakteblaj formatoj. Ne sendu .PDF-dokumentojn!
- Sendu ankaŭ altkvalitajn bildojn, kaj nepre ne en la teksta dokumento. La bildoj devas veni kun jenaj informoj por ĉiu: klarigo de la bildo (titolo) kaj fotinto. Se vi ne estas la fotinto, ne sendu foton sen la skriba permeso de ĝia aŭtoro. Atentu: ne sendu tro da bildoj en unu mesaĝo iuj povus malaperi survoje;
- Bonvolu sendi la kontribuojn kiel eble plej frue. Ne atendu ĝis la lasta momento;
- Estu preta reagi rapide al la petoj de la redaktoroj kaj respektu la limdatojn;
- Ĉiujn materialojn oni sendu al la jena retadreso: iea@esperanto.or.id.

Se vi bezonas pliajn informojn aŭ klarigojn, bonvolu kontakti nin per la ĉi-supra retadreso.

La limdato por kontribuoj al la 12a eldono estas la 20a de Majo 2017. Dankon.


Esperanto atau secara online. Hindari kesalahan tulisan dan buatlah dalam gaya yang baik;


- Mohon kirimkan tulisan dalam format yang dapat disunting. Jangan kirimkan tulisan dalam format .PDF!
- Kirimkan juga gambar berkualitas tinggi, yang terpisah dari dokumen teks. Sertakan penjelasan gambar dan pembuat foto. Jika Anda bukan pembuat foto, jangan kirimkan foto tanpa izin tertulis dari pemiliknya. Perhatian: jangan mengirim banyak gambar dalam sekali pengiriman. Foto bisa saja hilang saat pengiriman;
- Silakan kirim kontribusi Anda sesegera mungkin. Jangan menunggu hingga tenggat waktu;
- Bersiaplah untuk bereaksi dengan cepat merespon permintaan redaksi dan mematuhi batas waktu;
- Kirimkan seluruh materi ke alamat berikut: iea@esperanto.or.id.

Jika Anda memerlukan lebih banyak informasi dan penjelasan, silakan hubungi kami melalui alamat e-mail di atas.

Batas akhir penyerahan naskah untuk edisi 12 adalah 20 Mei 2017. Terima kasih.

Esperanto en Indonezio

 Duonjara oficiala bulteno de la Indonezia Esperanto-Asocio (IEA). Naskiĝis en 2013. Sendita al IEA membroj senpage.

 *Buletin per semester resmi dari Asosiasi Esperanto Indonesia (AEI). Terbit semenjak tahun 2013. Didistribusikan kepada anggota AEI secara cuma-cuma.*



Ĉefa Redaktoro

Penyunting Utama

Arman Yusuf

Plenuma Redaktoro

Penyunting Pelaksana

Ilia Sumilfia Dewi

Arya Ferduzi

Sesti Kusmayati

Provleganto

Penyunting Bahasa

Piet Buijnsters

(Nederlando)

Alamat Redaksi

Redaktoro-Adreso

Wisma Sarinah Lt. 1 (Gripwell)

Jl. Majapahit No. 8

Jakarta 10160 Indonesia

✉ iea@esperanto.or.id

☎ [+628-111-77-33-87](tel:+628-111-77-33-87)

